

Obama vizitis la urbon Hiroŝimo



Sepdek unu jarojn antaŭe, en serena, sennuba mateno, morto falis de la ĉielo kaj la mondo ŝanĝiĝis. Ekbrilo de lumo kaj muro de fajro detruis la urbon kaj montris, ke la homaro posedas la rimedon por sin detruiri.

Kial ni venas al tiu ĉi loko, al Hiroŝimo? Ni venas por pensi pri la terura forto derimenita en ne tiel fora pasinteco. Ni venas ĉi tien por prilamenti la mortintojn de pli ol cent miloj da japanaj viroj, virinoj kaj infanoj, miloj da koreoj kaj dekduoj da usonaj militkaptitoj. Iliaj spiritoj parolas al ni. Ili petas, ke ni introspektu kaj taksu, kio ni estas kaj kio ni povu fariĝi.

Estas ne la fakto de la milito, kiu elstarigas Hiroŝimon. Artefakto montras al ni, ke violenta konflikto aperis inter tre komencaj homoj. Niaj

prauloj, lerninte fari klingojn el siliko kaj lancon el ligno, uzis tiujn ilojn ne nur por ĉasado, sed ankaŭ kontraŭ sia propra raso. En ĉiuj kontinentoj la historio de civilizacio estas plena de milito, pro manko de nutraĵoj aŭ avido je oro, aŭ pro ŝovinista febro aŭ religia fervolo. Imperioj leviĝis kaj falis, popoloj estis subjugigitaj kaj liberigitaj, kaj en ĉiuj vojkrucoj sennombraj, senkulpaj homoj viktimiĝis, kies nomoj dume estas forgesitaj.

La mondmilito, kiu atingis la brutalan finon en Hiroŝimo kaj Nagasaki, estis batalo inter la plej riĉaj kaj plej fortaj landoj en la mondo. Iliaj civilizacioj donis al la mondo grandajn urbojn kaj belegan arton. Iliaj pensuloj antaŭenirigis ideojn de justeco, harmonio kaj vero. Tamen la milito estiĝis de la sama, baza instinko por superregado aŭ konkerado, kiu kaŭzis konfliktojn inter la plej simplaj triboj, malnova modelo pliigita de novaj kapabloj kaj sen nova limigo.

Dum kelkaj jaroj de la milito mortis 60 milionoj. Viroj, virinoj, infanoj, ne malsamaj kiel ni, estis pafitaj, batitaj, paŝigitaj, bombitaj, enprizonigitaj, malsanigitaj aŭ gase venenigitaj al morto. Troviĝas multaj lokoj en la mondo, kiuj kronikas tiun militon, multaj memoraĵoj, kiuj rakontas pri kuraĝo kaj heroismo, kaj multaj tomboj kaj vakaj koncentrejoj, kiuj eĥas per neesprimeblaj depravicioj.

Tamen, en la imago de funga nuboj, kiu leviĝis en tiujn ĉielojn, ni plej akre rememoras homaran kernan kontraŭdiron, kiel tiu ĝusta sparko, kiu markas nin kiel specio, niaj pensoj, niaj imagpovoj, niaj lingvoj, nia ilo-faro, nia kapablo apartigi nin de la naturo kaj konformigi ĝin al nia volo, ĝuste tiuj aferoj ankaŭ donas al ni kapablon por nekredebla detruado.

Kiel ofte materia antaŭenigo aŭ socia novigo blindigas nin al tiu vero, kiel facile ni lernas pravigi violenton en la nomo de iu plialta motivo? Ĉiuj gravaj religioj promesas vojon al amo, paco kaj justeco, sed neniu religio estas libera de kredantoj, kiuj postulas ilian kredon kiel licencon por mortigo.

Nacioj leviĝas, rakontante rakonton, kiu ligas la popolon kune en sinofero kaj kunlaboro, ebligante rimarkindan atingon, sed tiuj samaj rakontoj estas tre ofte uzataj por premi kaj malhumanecigi tiujn, kiuj estas malsamaj.

Scienco ebligas al ni komunikadon trans maroj kaj flugadon super nuboj, kuracadon de malsanoj kaj komprenon pri la kosmo. Sed tiuj samaj eltrovoj povas esti transformitaj en multe pli efikajn mortigajn maŝinojn. La militoj de la moderna epoko instruas tiun veron, Hiroŝima instruas tiun ĉi veron.

Teknologiaj progreso sen ekvivalenta progreso en humana institucio povas pereigos nin. La scienca revolucio, kiu kondukis fisian de atomo, same postulas moralan revolucion. Tial ni venis ĉi tien. Ni staras ĉi tie, meze de la urbo, kaj provas mem imagi la momenton de la bombo-falo. Ni provas mem senti teruron de infanoj konfuzitaj de tio, kion ili vidas. Ni aŭskultas silentan krion. Ni rememoras ĉiujn senkulpulojn mortigitajn trans la arko de tiu terura milito, kaj la militojn, kiuj venis antaŭe kaj la militojn, kiuj sekvos.

Simplaj vortoj ne povas doni voĉojn al tiuj suferadoj, sed ni havas dividitan respondecon por direkte vidi en la okulojn de historio kaj demandi, kion ni devas fari malsame por bridi tian denovan suferadon. Iun tagon la voĉoj de hibakuŝa (atombombitoj) ne plu estos kun ni por transdoni ateston. Sed la memoro de la mateno de la 6a de aŭgusto, 1945, devas ne velki. Tiu memoro ebligas al ni memkontentan batalon. Ĝi instigas nian moralan imagpovon kaj ebligas al ni ŝanĝon.

Kaj ekde la fatala tago, ni faris elektojn, kiuj donas al ni esperon. Usono kaj Japanio forĝis ne nur aliancon, sed ankaŭ amikecon, kiu donis multege pli por niaj popoloj, ol ni povus ricevi tra milito.

La nacioj de Eŭropo konstruis union, kiu anstataŭigis batalkampojn per ligoj de komerco kaj demokratio. Subpremataj popoloj kaj nacioj akiris

liberecon. Internacia komunumo establis instituojn kaj traktatojn, kiuj funkcias por eviti militon kaj aspire restrikti kaj redukti kaj finfine elimini ekziston de nukleaj armiloj.

Tamen, ĉiu ago de agreso inter nacioj, ĉiu ago de teruro, koruptado, kruelo kaj opreso, kiujn ni vidas en la tuta mondo, montras, ke nia laboro estas neniam plenumata.

Ni ne povos elimini homan kapablon fari malbonon, tial nacioj kaj la alianco, kiun ni establis, devas posedi rimedojn por defendi sin. Sed inter tiuj nacioj kiel la mia, kiuj posedas nukleajn stokadojn, ni devas havi kuraĝon por eskapi el la logiko de timo kaj serĉi la mondon sen tiuj.

Ni ne povos efektiviĝi tiun celon dum mia vivo, sed persista klopodo povas redukti eblecon de katastrofo. Ni povas mapi la vojon, kiu kondukas al nuligo de tiuj stokadoj. Ni povas haltigi ilian disvastigon al novaj nacioj kaj teni pereigajn materialojn sekuraj for de fanatikuloj.

Sed tio ankoraŭ ne estas sufiĉa, ĉar ni vidas ĉirkaŭ la hodiaŭa mondo, kiel krudaj fusiloj kaj barelaj bomboj povas kaŭzi violenton en terura skalo. Ni devas ŝanĝi nian pensmanieron pri milito, por preventi konflikton tra diplomatio kaj strebi por fini konfliktojn, post kiam ili komenciĝis, por vidi nian kreskantan interdependentecon kiel kaŭzon por paca kunlaboro kaj ne kiel kaŭzon por violenta konkurenco, kaj por difini niajn naciojn ne per nia kapablo de detruado, sed per tio, kion ni povas konstrui.

Kaj, antaŭ ĉio, ni devas reimagi nian reciprokan ligojn kiel membroj de unu homa raso, ĉar ankaŭ tio igas nian specion originala. Ni ne estas ligita de nia gena kodo por ripeti la eraron de la pasinteco. Ni povas lerni. Ni povas elekti. Ni povas rakonti al niaj infanoj malsaman rakonton, tiun, kiu priskribas komunan homaron, tiun, kiu igas militon malpli probabla kaj kruelecon malplifacile akceptebla.

Ni vidas tiujn rakontojn en la hibakuŝa, la virino, kiu pardonas la piloton, kiu flugis kaj faligis atombombon, ĉar ŝi rekonis, ke kion ŝi vere

malamas, tio estas milito mem. La viro, kiu serĉis familiojn de usonanoj mortigitaj ĉi tie, ĉar li kredis, ke ilia perdo estas egala kiel la lia.

Mia nacia rakonto komenciĝis kun simplaj vortoj: “Ĉiuj homoj estas kreitaj egale, kaj dotitaj de nia Kreinto kun neforigeblaj rajtoj, inkluzive de vivo, libereco kaj serĉado de feliĉo.” Efektivigi tiun idealon ne estas facile, eĉ en nia propra landlimo, eĉ inter nia propraj civitanoj. Sed esti lojala al tiu rakonto indas je klopodo. Ĝi estas idealo, kiun oni devas strebi, idealo, kiu disvastiĝas trans la kontinentoj kaj trans la oceanoj. La neredukebla valoro de ĉiuj homoj, la insistado, ke ĉiu vivo estas valora, la baza kaj necesa koncepto, ke ni estas parto de unu homa familio, tio estas la rakonto, kiun ni ĉiuj devas rakonti.

Tial ni venis al Hiroŝima, por ke ni povu pensi pri homoj, kiujn ni amas, la unua rideto de niaj infanoj en la mateno, la milda tuŝo de edzino trans la kuireja tablo, la komforta brakumado de patrino. Ni povas pensi pri tiuj aferoj kaj scias, ke tiuj samaj voloraj momentoj okazis ĉi tie, 71 jarojn antaŭe. Kiuj mortis, tiuj estas samaj kiel ni.

Ordinaraj homoj komprenas tion, mi opinias. Ili ne plu volas militon. Ili volas, ke la miroj de scienco estu enfokusigitaj al plibonigo de la vivo kaj ne al ĝia eliminado. Kiam la elekto farita de nacioj, kiam la elekto farita de politikaj gvidantoj, reflektas tiun simplan saĝecon, tiam la leciono de Hiroŝima estas farita.

La mondo eterne ŝanĝiĝis ĉi tie. Sed hodiaŭ la infanoj de tiu ĉi urbo pasigas la tagojn en paco. Kiel valora afero tio estas! Tio estas protektenda, kaj jen etendenda al ĉiuj infanoj. Tio estas estonteco, kiun ni povas elekti, estonteco, en kiu Hiroŝima kaj Nagasaki estas konataj ne kiel “la tagiĝo de nuklea milito”, sed kiel la ekstarto de nia propra morala vekigo.

「Seventy-one years ago, on a bright...」

Obama en la ceremonio en Hiroŝima

la 27an de majo 2016

Seventy-one years ago, on a bright cloudless morning, death fell from the sky and the world was changed. A flash of light and a wall of fire destroyed a city and demonstrated that mankind possessed the means to destroy itself.

Why do we come to this place, to Hiroshima? We come to ponder a terrible force unleashed in the not so distant past. We come to mourn the dead, including over 100,000 Japanese men, women and children, thousands of Koreans and a dozen Americans held prisoner.

Their souls speak to us. They ask us to look inward, to take stock of who we are and what we might become.

It is not the fact of war that sets Hiroshima apart. Artifacts tell us that violent conflict appeared with the very first man. Our early ancestors, having learned to make blades from flint and spears from wood, used these tools not just for hunting but against their own kind.

On every continent the history of civilization is filled with war, whether driven by scarcity of grain or hunger for gold, compelled by nationalist fervor or religious zeal. Empires have risen and fallen, peoples have been subjugated and liberated, and at each juncture innocents have suffered -- a countless toll, their names forgotten by time.

The World War that reached its brutal end in Hiroshima and Nagasaki was fought among the wealthiest and most powerful of nations. Their civilizations had given the world great cities and magnificent art. Their thinkers had advanced ideas of justice and harmony and truth, and yet the war grew out of the same base instinct for domination or conquest that had caused conflicts among the simplest tribes, an old pattern amplified by new capabilities and without new constraints.

In the span of a few years some 60 million people would die: men, women, children -- no different than us, shot, beaten, marched, bombed, jailed, starved, gassed to death.

There are many sites around the world that chronicle this war -- memorials that tell stories of courage and heroism, graves and empty camps that echo of unspeakable depravity.

Yet in the image of a mushroom cloud that rose into these skies, we are most starkly reminded of humanity's core contradiction -- how the very spark that marks us as a species, our thoughts, our imagination, our language, our tool making, our ability to set ourselves apart from nature and bend it to our will -- those very things also give us the capacity for unmatched destruction.

How often does material advancement or social innovation blind us to this truth? How easily do we learn to justify violence in the name of some higher cause?

Every great religion promises a pathway to love and peace and righteousness. And yet no religion has been spared from believers who have claimed their faith has a license to kill.

Nations arise telling a story that binds people together in sacrifice and cooperation, allowing for remarkable feats, but those same stories have so often been used to oppress and dehumanize those who are different. Science allows us to communicate across the seas, fly above the clouds, to cure disease and understand the cosmos. But those same discoveries can be turned into ever more efficient killing machines.

The wars of the modern age teach us this truth. Hiroshima teaches this truth. Technological progress without an equivalent progress in human institutions can doom us. The scientific revolution that led to the splitting of an atom requires a moral revolution as well.

That is why we come to this place. We stand here in the middle of this city and force ourselves to imagine the moment the bomb fell. We force ourselves to feel the dread of children confused by what they see.

We listen to a silent cry. We remember all the innocents killed across the arc of that terrible war, and the wars that came before, and the wars that would follow.

Mere words cannot give voice to such suffering. But we have a shared responsibility to look directly into the eye of history and ask what we must do differently to curb such suffering again.

Some day the voices of the Hibakusha will no longer be with us to bear witness. But the memory of the morning of August 6, 1945 must never fade. That memory allows us to fight complacency. It fuels our moral imagination, it allows us to change.

And since that fateful day we have made choices that give us hope. The United States and Japan forged not only an alliance, but a friendship that has won far more for our people that we can ever claim through war.

The nations of Europe built a union that replaced battlefields with bonds of commerce and democracy. Oppressed peoples and nations won liberation. An international community established institutions and treaties that worked to avoid war and aspired to restrict and roll back and ultimately eliminate the existence of nuclear weapons.

Still, every act of aggression between nations, every act of terror and corruption and cruelty and oppression that we see around the world shows our work is never done. We may not be able to eliminate man's capacity to do evil, so nations and the alliances that we formed must possess the means to defend ourselves.

Among those nations like my own that hold nuclear stockpiles, we must have the courage to escape the logic of fear and pursue a world without them. We may not realize this goal in my lifetime, but persistent effort can roll back the possibility of catastrophe.

We can chart a course that leads to the destruction of these stockpiles, we can stop the spread to new nations, and secure deadly materials from fanatics. And

yet that is not enough, for we see around the world today how even the crudest rifles and barrel bombs can serve up violence on a terrible scale.

We must change our mindset about war itself -- to prevent conflicts through diplomacy and strive to end conflicts after they've begun; to see our growing interdependence as a cause for peaceful cooperation and not violent competition; to define our nations not by our capacity to destroy but by what we build. And perhaps above all we must reimagine our connection to one another as members of one human race -- for this too is what makes our species unique.

We're not bound by genetic code to repeat the mistakes of the past. We can learn. We can choose. We can tell our children a different story, one that describes a common humanity, one that makes war less likely and cruelty less easily accepted.

We see these stories in the Hibakusha: the **women** who forgave a pilot who flew the plane that dropped the atomic bomb because she recognized what she really hated was war itself; the man who sought out families of Americans killed here because he believed their loss was equal to his own.

My own nation's story began with simple words: "All men are created equal, and endowed by our Creator with certain unalienable rights, including life, liberty and the pursuit of happiness."

Realizing that ideal has never been easy, even within our own borders, even among our own citizens. But staying true to that story is worth the effort. It is an ideal to be strived for, an ideal that extends across continents and across oceans.

The irreducible worth of every person, the insistence that every life is precious, the radical and necessary notion that we are part of a single human family: that is the story that we all must tell.

That is why we come to Hiroshima, so that we might think of people we love, the first smile from our children in the morning, the gentle touch from a spouse over the kitchen table, the comforting embrace of a parent.

We can think of those things and know that those same precious moments took place here 71 years ago. Those who died, they are like us.

Ordinary people understand this, I think. They do not want more war. They would rather that the wonders of science be focused on improving life and not eliminating it.

When the choices made by nations, when the choices made by leaders reflect this simple wisdom, then the lesson of Hiroshima is done.

The world was forever changed here, but today the children of this city will go through their day in peace. What a precious thing that is. It is worth protecting and then extending to every child.

That is a future we can choose, a future in which Hiroshima and Nagasaki are known not as the dawn of atomic warfare, but as the start of our own moral awakening.

HORI JASUO